

Superrigardo pri KODEJO
2012–2013



Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

Nieuwe Binnenweg 176
3015 BJ Rotterdam
Nederlando

Sub respondeco de Michael Boris MANDIROLA
Vicprezidanto de TEJO

Danke al:

POÓR Veronika
estranano de TEJO
pro kompilado de la malneto

Munir ABĴIU kaj Roĉjo HUURMAN
TEJO-volontuloj
pro antaŭa kunlaboro

18/12/2014

Enhavo

<u>Enkonduko.....</u>	<u>2</u>
<u>Partoprenintaj landaj sekcioj.....</u>	<u>2</u>
<u>Membraro.....</u>	<u>7</u>
<u>Kunlaboroj.....</u>	<u>9</u>
<u>Kunlaboro kun aliaj LSj.....</u>	<u>9</u>
<u>Kunlaboro kun aliaj ne-Esperanto-asocioj.....</u>	<u>10</u>
<u>Membreco en Nacia Junulara Konsilio.....</u>	<u>10</u>
<u>Estraro.....</u>	<u>11</u>
<u>Informiloj.....</u>	<u>12</u>
<u>Renkontiĝoj.....</u>	<u>14</u>
<u>Konkludo.....</u>	<u>15</u>

Enkonduko

La ĉefa celo de KODEJO (Kompleta Demandaro por Esperantaj Junularaj Organizoj) estas ekkoni la aktualan staton de la landaj sekcioj de TEJO, havi pli da informoj pri iliaj situacio, agadoj, sukcesoj kaj problemoj. Rilate al la jaro 2013, la demandaron respondis 29 landaj sekcioj kaj 2 kandidatoj (KolombEJO kaj FEJ), kio estas pli ol tiu de 2012 (22 landaj sekcioj kaj 2 kandidatoj), kaj 2011 (24 landaj sekcioj kaj 1 kandidato), iom malpli ol tiu de 2010 (33 asocioj), iom pli ol tiu de 2009 (25 asocioj) kaj pli ol tiu de 2008 (19 asocioj). Por simpleco ekde nun en la dokumento kiam ni indikas landan sekcion (mallongigo: LS), ni ĉiam pensas pri ĉiuj 31 organizoj.

Respondecoj de la landaj sekcioj estis petitaj respondi la demandaron inter januaro kaj marto 2014 per reta formularo, kiu aŭtomate sendis la informojn en Google-tabelon.

Aldonindas, ke ĉi-jare la demandaro estis signife ŝanĝita. Unuflanke estis klopodo pli objektivigi la demandojn, tiel ke la respondoj malpli dependu de la taksoj de la homo kiu plenigas la formularon, aliflanke estis strebo ke la demandoj temu pri la plej indikaj aferoj, kiuj povas difini la bonfarton de landa sekcio.

Partoprenintaj landaj sekcioj

La jenaj asocioj partoprenis la enketon:


- Juna Esperantistaro Argentina (JEA)
- Aŭstria Esperanto-Junularo (AEJ)
- Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO)
- Junularo Esperantista Brita (JEB)

- Junulara Esperantista Burunda Organizo (JEBUO)
- Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ)
- Ĉina Junulara Esperanto-Asocio (ĈJEA)
- Dana Esperantista Junulara Organizo (DEJO)
- Filipina Esperanto-Junularo (FEJ) – kandidato por iĝi LS
- Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO)
- Junulara Esperantista Franca Organizo (JEFO)
- Germana Esperanto-Junularo (GEJ)
- Hispana Esperanto-Junulara Societo (HEJS)
- Hungara Esperanto-Junularo (HEJ)
- Itala Esperantista Junularo (IEJ)
- Japana Esperanto-Junularo (JEJ)
- Kataluna Esperanto-Junularo (KEJ)
- Kolombia Esperanta Junulara Organizo (KolombEJO) – kandidato por iĝi LS
- Korea Esperanto-Junularo (KEJ)
- Kroatia Esperanto-Junulara Asocio (KEJA)
- Junulara Sekcio de Kuba Esperanto-Asocio (JSK)
- Meksika Esperanto-Junularo (MEJ)
- Nederlanda Esperanto-Junularo (NEJ)
- Nepala Esperantista Junulara Organizo (NEJO)
- Norvega Junularo Esperantista (NJE)
- Pola Esperanto-Junularo (PEJ)
- Rusia Esperantista Junulara Movado (REJM)
- Slovakia Esperanta Junularo (SKEJ)
- Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo (SEJU)
- Ukraina Ligo de Esperantista Junularo (ULEJ)
- Vjetnama Esperantista Junulara Organizo (VEJO)

El la 31 respondintaj organizoj estis 1 afrika, 5 amerikaj, 6 aziaj, 1 eŭrop-azia kaj 18 eŭropaj asocioj.

Pli ol duono (17) de la respondintaj asocioj ne deklaris sian strukturon. Inter tiuj, kiuj deklaris strukturon, 7 estas junulara sekcio de nejunulara organizo, 5 estas sendependa organizo kun jura personeco kaj nur 2 estas sendependaj organizoj sen jura personeco, ambaŭ kandidatoj. Tamen enplektante datumojn el pasintaj jaroj por la nedekalrintaj, eblas konkludi ke la plej verŝajna statistiko estas 17 – 8 – 6, kiel videblas en la ilustraĵo 1, kiun ni povas


rigardi en la komparo kun2012:




Ilustraĵo 1

En la ilustraĵo 2 videblas la aktiveca stato de la organizoj. Ĉi-jare la Estraro de TEJO decidis provi mezuri la aktivecojn laŭ diversaj indikoj troveblaj ĉe tejo.org, tial la komparo kun la antaŭaj jaroj, kiam estis subjektiva memtaksado, povas esti iom malfacila. Tiu ĉi nova sistemo estis enkondukita por havi iom pli kompareblajn datumojn de jaro al jaro, ĉar la plenigantoj de la enketilo ŝanĝiĝas de jaro al jaro. Laŭ la taksado de la poenta sistemo, kiu metas diversajn postulojn por ĉiu nivelo, 1 organizo estas aktivega, neniuj estas aktiva, 2 estas vekigantaj, 18 estas zorgigaj kaj 10 estas dormantaj. Rimarkindas, ke la nova sistemo estas tre strikta, ĝi estis tiel kreita por montri la gravecon de la diversaj agadoj al la landaj sekcioj. La diferenco en la pritakso videblas en la jena sinsekvo de la antaŭa kaj la nuna taksoj.

Aktiveca stato de la organizoj




Aktiveca stato de organizoj



Ilustraĵo 2

En la ilustraĵo 3 videblas kiel la organizoj taksis sian staton en la antaŭaj jaroj. Ĝis 2012 kreskis la procentaĵo de la organizoj, kiuj konsideras sin aktivaj. Estas kontentige, ke laŭ la enketo dum la lastaj 5 jaroj ĉiam pli ol duono de la respondintaj landaj sekcioj taksas sin aktivaj. En 2008, 58% de ili raportis, ke ili estas aktivaj, dum en 2009 nur 52%. En 2010, 56% de la respondintoj konsideris sin aktiva, kaj en 2011, 65% kaj en 2012 denove 52%. Evidente la ŝanĝo al pli objektivaj, sed ege postulaj kriterioj draste ŝanĝis la situacion.

Stato de la organizoj laŭjare




Ilustraĵo 3


Rimarkinda estas ankaŭ, ke malkreskis la procentaĵo de la organizoj, kiuj taksas sin vekigantaj. La procentaĵo de tiuj asocioj en 2008 estis 37%, en 2009 36%, dum en 2010 ĝi falis al 13%, en 2011 kaj estis nur 9% kaj en 2012 refoje 13%. Evidente ankaŭ tiu datumo estas ne plu aktuala laŭ la nova kriteriaro, kie cetere estis aldonita la kategorio “zorgiga”. La procentaĵo de la dormantaj asocioj montris la kontraŭon, nome kreskantan tendencon ĝis 2012.

La ilustraĵo 4 informas nin pri la financa stato de la organizoj. 20 organizoj indikis, ke ili havas pozitivan bonhavan, 8 organizoj indikis ke ili ne havas financojn kaj nur 3 organizoj indikis, ke ilia sekcio estas relative riĉa. Ni povas samtempe fari komparon kun la situacio en 2012:

Financa stato de la organizoj



Financa stato de la organizoj




Ilustraĵo 4

Plej rimarkinda evoluo, malgraŭ la malsama demando, estas, ke ne plu ekzistas organizoj kun financoj, sed en apenaŭa pluvivo.

Laŭ la ilustraĵo 5 videblas, ke plejmulto (18) de la LS-oj neniam petis subvenciojn aŭ serĉis eksterajn monfontojn. Tio estas zorgiga, ĉefe se oni vidas, ke laŭ la ilustraĵo 4 nur 3 organizoj indikis, ke ilia sekcio estas relative riĉa kaj donas la esperon, ke el la 13 LS-oj petintaj monon nun aŭ pasinte, 12 ricevis ĝin.

Subvencipetoj



Ilustraĵo 5

Membraro


La sekva ero traktas informojn rilatajn al la membroj de la asocioj.

Pri pagigo, diversaj asocioj havas malsamajn kutimojn kiel, aŭ ĉu entute, pagigi siajn membrojn. Laŭ la raportoj en 10 asocioj la membroj ne pagas kotizojn, en 9 asocioj ĉiuj membroj pagas kotizon, kaj en 11 asocioj ne ĉiu membro pagas la membrkotizon. La averaĝa membronombro estas 21.

Ĉi-jare aldoniĝis nova demando rilate al la membroadministrado de la asocioj.

Pri la stabileco de la membronombroj 8 asocioj deklaris ke ilia membronombro kreskas, 17 ke ilia membronombro stabilas kaj 6 asocioj havas falantan membronombro, kiel

videblas sube, en la ilustraĵo 6.



Ilustraĵo 6

La akiro de novaj membroj estas ĝenerale unu el la plej defiaj taskoj de la junularaj organizoj, ne nur en la Esperanta movado. Al la malfermita demando rilate la varbadajn manierojn, alvenis pluraj tre konkretaj kaj diversaj respondoj.

La diversaj landaj sekcioj uzas tre malsimilajn manierojn varbi por Esperanto kaj por membriĝo. Tio estas ĝojiga, ĉar montras kreemon kaj grandan adaptiĝemon al la loka situacio. Nun venu eta resumo kiel la landaj sekcioj varbas novajn membrojn kaj poste kiel ili varbas por Esperanto.

La landaj sekcioj uzas la servojn de interretaj kursoj kaj kunlaboras kun ili. La LS-oj vizitas ankaŭ la ĉeestajn kursojn por informi pri siaj agadoj kaj tiel ankaŭ varbi novajn membrojn. Aldone, LS-oj uzas diversajn rabatojn, ekzemple por la samtempa aliĝo al LS kaj TEJO aŭ petante subtenon de plenkreskuloj por la aliĝkotizoj de junuloj. En kelkaj landoj ekzistas ankaŭ interkonsento, ke tiuj membroj, kiuj aĝas malpli ol 30, aŭtomate estas membroj de la junulara sekcio. Aldone estis menciita la publikigo de evoluanta laborplano, serioza interna administrado, do resume la profesiigo kaj travidebligo de la landaj sekcioj por allogi novajn aktivulojn kaj membrojn.

Por varbado por Esperanto, la landaj sekcioj kunlaboras kun ne-esperantistaj organizoj kaj aranĝoj, uzas Esperanton en publika spaco, kreas kaj subtenas lokajn, universitatajn, lerneajn klubojn, organizas senpagajn Esperanto-kursojn, kreas bibliotekojn, organizas interretajn, sociretajn kaj flugfoliajn kampajnojn, prelegojn kaj invitas konatojn.

La kunlaboro kun ne-esperantistaj organizoj okazas ekzemple pere de tradukado de retejoj, kunlaborante kun urbestroj, lernejoj, interesitaj grupoj, partoprenado al ne-esperantistaj eventoj aŭ eventoj iel rilataj al lingvo, aŭ partopreno en la urbaj kaj universitataj festivaloj kun Esperanto-budo. Estis menciita ankaŭ la projekto "Universitato de Esperanto", kiu celas pere de prelegoj en universitato informi nacilingve pri la lingvo kaj ĝia utileco.

Agado en publika spaco okazas ekzemple per videbla uzado de Esperanto en ĉiutaga vivo, ekzemple festante Esperantajn festojn urbe.


Universitatoj, lernejoj estas vaste uzataj ankaŭ kiel lokoj por la flugfoliaj kampanjoj.

Al ambaŭ kategorioj apartenas la Esperanto-aranĝoj kaj la retpaĝo. Ili estas vaste uzataj por teni membrojn kaj varbi novajn aktivulojn, kaj samtempe por varbi al Esperanto. Tial kelkaj landaj sekcioj organizas malferman tagon dum la aranĝoj, kunlaboras kun

maljunularaj organizantoj aŭ organizas aranĝojn proksime al la lokoj, kie estas novuloj, interesiĝantoj.

Ĝenerale oni povas diri, ke la asocioj utiligas kaj la interretan, kaj la malvirtualan kontaktojn – ĉu personajn, ĉu kun la publiko, ĉu montrante la uzon de Esperanto, ĉu parolante pri ĝi. Bedaŭrinde 5 respondintaj asocioj skribis, ke ili faras nenion por varbi novajn membrojn.

Pri la asembleoj, la ilustraĵo 7 montras, ke plimulto de la asocioj kunvenas ĉiujare aŭ pli ofte kaj estas po 8 asocioj, kiuj kunvenas ĉiun duan jaron aŭ pli ofte, kaj kiuj kunvenas malpli ofte ol ĉiun duan jaron.



Ilustraĵo 7

Kunlaboroj

Kunlaboro kun aliaj LSj

La ilustraĵo montras, ke ĉirkaŭ unu triono (10) el la respondintaj LS-oj havas kunlaboron kun aliaj organizoj, 8 pliaj ne kunlaboras sur la organiza nivelo, sed persone, kaj 13 landaj sekcioj ne havas kunlaboron kun aliaj landaj sekcioj.

Kunlaboro inter diversaj LSj




Ilustraĵo 8

Kunlaboro kun aliaj ne-Esperanto-asocioj

La ilustraĵo 9 montras kun kiom da ne-esperantistaj organizoj la landaj sekcioj de TEJO havas kontakton. Videblas, ke el la 31 organizoj: 6 aktive kunlaboras en aktuala projekto, 4 havis komunan projekton iam dum la pasintaj tri jaroj, kaj 21 ne kunlaboras.

Kunlaboro kun neesperantista organizo



Ilustraĵo 9

Membreco en Nacia Junulara Konsilio

La ilustraĵo 10 montras kiom da landaj sekcioj membras en sia nacia junulara konsilio. Temas pri 4 organizoj kiel plenaj membroj kaj 2 kiel observantoj. Tio montras, ke oni jam eklaboris pri tio, sed temas nur pri kelkaj kazoj.

Membreco en la Nacia Junulara Konsilio



Ilustraĵo 10

La situacio pri eksteraj rilatoj de la LS-oj estas klare progresigenda.

Estraro


En la sekva parto aperas informoj pri la estraroj de la landaj sekcioj.

La estraroj konsistas plej ofte de 1 ĝis 10 personoj, kaj en 28 kazoj LS havas prezidanton, 3 asocioj deklaris ke ili ne havas prezidanton.

Respondante al la demando pri estraraj kunvenoj, 14 organizoj raportis, ke ili fizike kunvenas pli ol dufoje jare, dum 3 asocioj informis ke ili kunvenas dufoje. Estis 7 organizoj, kies estraroj havas fizikan kunsidon unufoje jare, dum 6 landaj sekcioj raportis, ke ilia estraro ne kunvenas ĉiujare. Bedaŭrinde, ne estas informo ĉu tiuj asocioj entute kunvenas fizike.

Aldone al la fizikaj estrarkunvenoj, indas scii ankaŭ, kiom ofte la estraro de LS kunsidas rete, kio ja estas la pli rapida kaj komforta maniero kunsidi, eĉ se ne certe tiu pli efika. Kiel montras la ilustraĵo 11, 9 asocioj raportis pri ĉiumonata retkunsido, 3 organizoj informis pri dumonataj virtualaj kunvenoj. Pli ol triono de la asocioj (12) neregule kunvenadas rete kaj 6 asocioj sciigas, ke ili ĝis nun neniam kunvenis en tiu formo.

Ofteco de retaj estrarkunsidoj




Ilustraĵo 11

Estas interese rigardi la oftecon de la retkunsidoj de tiuj 6 organizoj, kiuj skribis, ke ili

ne kunvenas ĉiujare: estas inter ili du organizoj, kiuj indikis, ke ili ne havas virtualan kunsidon aŭ diskutliston.

Por enestrara komunikado, pli ol du trionoj de la landaj sekcioj (21) uzas diskutliston, kiel oni povas tion vidi en la ilustraĵo 12.


Diskutlisto de la estraro



Informiloj

La jena parto pritraktas la informilojn uzatajn de la landaj sekcioj.


Ĉeesto ĉe sociaj retejoj



Ilustraĵo 12

La ilustraĵo 12 montras, ke sociaj retejoj estas vaste uzataj por informi pri la agadoj, 25 sekcioj ĉeestas ĝin kaj el ili 17 sekcioj almenaŭ ĉiumonate ĝisdatigas ĝin. Ankaŭ emblemoj estas tre disvastigitaj, 21 de la LS-oj havas sian propran markon. Pri la retpaĝoj la situacio estas iom pli zorgiga. 8 landaj sekcioj entute ne havas retpaĝon, el la 23 LS-oj kiuj ĝin havas, 9 ne ĝisdatigas ĝin regule, kaj nur 10 LS-oj ĝisdatigas sian retpaĝon almenaŭ unufoje monate. Inter tiuj 23 landaj sekcioj, kiuj havas retpaĝon, 17 havas dulingvan retpaĝon, 1 nur en Esperanto kaj 5 nur en la nacia aŭ regiona lingvo, kiel tion montras la sekva ilustraĵo.


Lingvo de la retpaĝo



Ilustraĵo 13

Krome, pri la interna komunikado de la landaj sekcioj menciindas novaĵleteroj (9), rubrikoj en aliaj revuoj (8), propraj elektronikaj eldonoj (4). Surprizinda estas, ke nur du LS-oj menciis diskutlistojn por aktivuloj, aliflanke ni certas kaj esperas, ke temis nur pri miskompreno de la demandoj. Aldone, 2 LS-oj eldonas paperajn komunikilojn. Krome, blogoj, neregulaj rektaj mesaĝoj al la membroj kaj Facebook-grupoj estas uzataj kiel internaj komunikiloj.

Iloj de interna komunikado



Ilustraĵo 14

Substrekindas, ke la supraj datumoj rilatas al la stato deklarita de LS kaj povis okazi forgesoj kaj flankenlasoj.


Ĉi-jare estis ankaŭ demando pri *mojosaĵoj*. 8 landaj sekcioj indikis, ke ili eldonas kelkajn *mojosaĵojn*. Inter ili estas menciitaj T-ĉemizoj, botelmalfermiloj, glumarkoj, ludoj, kaskedoj, valizaj elastaj indentigaj zonoj kaj plastaj glasoj.

Renkontiĝoj

Renkontiĝoj estas tre gravaj por la landaj sekcioj, pere de ili eblas kunlaborigi la junulojn, akiri novajn membrojn, kontaktiĝi kaj eventuale kunlabori kun aliaj LS-oj.

La ilustraĵo 15 montras la oftecojn de renkontiĝoj, kiujn la LS-oj mem organizis por siaj membroj.

Ofteco de renkontiĝoj por membroj



Ilustraĵo 15

Krome, ankaŭ ege gravas la ofteco de internaciaj aranĝoj, ilin eblas vidi en la ilustraĵo 17 kaj laŭ la informoj prezentitaj, ĉirkaŭ triono de la organizoj okazigas internacian aranĝon almenaŭ unufoje jare, triono aranĝas malpli ofte, kaj triono ne aranĝas internaciajn renkontiĝojn.

Ofteco de organizado de internaciaj aranĝoj



Tabelo 1 montras la organizitajn eventojn de la LS-oj.

AEJ	Kafoklaĉo
	BEJK - Brazila Esperantista Junulara Kongreso (januare); NOVA - Novjara Aranĝo (decembre-januare);
BEJO	VINA - Vintra Aranĝo (julie).
ĈJEA	Komuna Seminario (decembre ĉiun trian jaron)
FEJO	FEJO-Tendaro (neregule)
GEJ	JES (jes.pej.pl)
HEJ	IJS, JER (dufoje)

HEJS	Iberia Renkontiĝo (tritaĝa, ĉiun trian jaron)
IEJ	IJF (paska), MJS (semajnfina, maja/junia)
JEB	JEB-renkontiĝo
JEFO	FESTO (aŭguste)
JEJ	Komuna Seminario (decembre ĉiun trian jaron) Junulara programo de Japana Esperanto-Kongreso
JSK	JuSKA- Junulara Somera Komuna Aranĝo. Krome ni helpas en la organizado de KERo (aranĝo de KEA).
KEJ	Komuna Seminario (decembre ĉiun trian jaron)
KEJ	Internaciisma renkontiĝo (3-taĝa)
KEJ	Iberia Renkontiĝo (tritaĝa, ĉiun trian jaron)
NEJ	KKPS (semajnfina)
NJE	kabana semajnfino kun FEJO
PEJ	Junulara E-Semajno - jarŝanĝe PEJ-kunveno – majo/junio PEJ-semajnfinoj - ĉiun duan aŭ trian monaton, foje kadre de aliaj eventoj Arkones - organizata de la poznana E-senco kun multnombra partopreno de PEJ kaj nia aktivula renkontiĝo ĈAR (Ĉelima Aŭtuna Renkontiĝo)- dediĉita al komencantoj kaj novuloj de PEJ, ĈEJ, kaj SKEJ
SKEJ	Somera Esperanto-Studado Tutslovakia Esperanta renkontiĝo (kunhelpantoj) CENTREJO (kunorganizantoj)
ULEJ	Humurino
VEJO	SoRen

Konkludo

La situacio de la landaj sekcioj de TEJO estas ege varia, sed ĝenerale estas tre malmultaj organizoj sen malfortaj punktoj.

Ŝajnas, ke fortaj organizoj plej ofte estas tiuj, kiuj organizas gravajn eventojn. Kvankam tio estas sufiĉe peza tasko, ĝi eble donas ankaŭ la motivojn por kunagado.

La kialo de la plej granda malforto ŝajne kuŝas en la malfermiĝo al la ekstera mondo, kie nemalmultaj organizoj ŝajnas neniom agadi.

Verŝajne estas necesa kunlaboro kaj interveno en specifaj kazoj kaj ni esperas, ke la starigo de mondregionaj komisionoj povos helpi al interveno kongrua kun la lokaj kondiĉoj.